

# La Serio Kanĵi-Vortaro por Lernantoj

Ĉefredaktoro Jack Halpern

The CJK Dictionary Institute

(La Vortara Instituto ĈJK)

## La KVL-Serio

Milionoj da homoj aktuale lernas la japanan lingvon en proksimume 15,000 lernejoj kaj aliaj edukaj institucioj tra la mondo. La nombro de la lernantoj rimarkinde kreskas precipe en landoj, kie oni ne parolas la anglan, – fakte multe pli rapide ol en angleparolantaj landoj. Sed tiuj lernantoj ofte apogas sin sur kanĵi-vortaroj kaj aliaj lerniloj skribitaj en la angla kaj ne en siaj gepatraj lingvoj.

**小** ▶ **PEQUENO**  
ショウ ちい(さい) こ- お- ㊦ ささ

0002	小	Jōyō-1	S3-3-0	C0034
1-1-2	42	F0035	㊦0007	U5C0F

1 2 3  
小 小 小

COMPOSTOS

① [também prefixo] [sentido original] (menor em tamanho, extensão ou quantidade) **PEQUENO, pouco, menor, curto, minúsculo, miniatura, diminuto**

小国 しょうこく pequena nação, potência menor

小説 しょうせつ romance, história, narrativa de ficção

小額 しょうがく pequena soma (de dinheiro)

小アジア しょうあじあ

la portugala eldono

**小** ▶ **KECIL**  
ショウ ちい(さい) こ- お- ㊦ ささ

0002	小	Jōyō-1	S3-3-0	C0034
1-1-2	42	F0035	㊦0007	U5C0F

1 2 3  
小 小 小

KATA MAJEMUK

① [juga awalan] [makna asal] (kurang dalam ukuran, tingkat, atau kuantitas) **KECIL, sedikit, minor, pendek, mungil, miniatur, renik**

小国 しょうこく negara kecil

小説 しょうせつ novel, cerita, fiksi

小額 しょうがく nilai yang kecil (untuk mata uang)

小アジア しょうあじあ Asia Kecil

小規模 しょうきぼ skala kecil

小東京 しょうとうきょう Tokyo kecil, miniatur

la indonezia eldono

Por kontentigi la urĝan bezonon pri bonkvalitaj lernomaterialoj de la japana en diversaj lingvoj krom la angla, **La Vortara Instituto ĈJK** (The CJK Dictionary Institute) elpaŝis kun projekto krei serion de alilingvaj eldonoj de **The Kodansha Kanji Learner's Dictionary** (La Kanĵi-Vortaro por Lernantoj de Kodansha), la ĝis nun plej sukcesa vortaro pri ĉindevenaj skribsignoj, foje tiel nomataj ideogramoj, uzataj en la japanlingvaj tekstoj. **La Serio Kanĵi-Vortaro por Lernantoj**, aŭ mallonge **KVL-Serio**, ofertas tiun ĉi norman referenclibron

en la plej gravaj lingvoj de la mondo, kun aparta atento pri la nombro de la japanlingvaj lernantoj en la koncernaj landoj kaj regionoj.

Ĉi-momente la jenaj dek du lingvoj estas kovrataj:

la araba	la indonezia
Esperanto	la korea
la franca	la portugala
la germana	la rusa
la hebrea	la taja
la hispana	la vjetnama


Ĉiu vortaro en la serio detale eksplikas la 1,006 bazajn kanĵiojn, kiuj estas instruataj al japanaj infanoj en la daŭro de ses jaroj en la elementa lernejo laŭ la preskribo de la japana Eduk-Ministerio. La KVL-Serio alprenas ĉiujn meritojn, pro kiuj la originalo gajnis altan reputacion inter fakuloj, instruistoj kaj lernantoj tra la mondo.

Moderna lingvistika teorio kaj rafinita informteknologio estis efike kombinitaj por produkti la serion de kanĵi-vortaroj, kaj oni trovos ĉiun el ili potenca, facile uzebla lernilo por lernantoj kaj oportuna fonto de informoj por instruistoj.

## La Angla Eldono

La KVL-Serio estas kompilata sur la bazo de la originala angla eldono, **The Kodansha Kanji Learner's Dictionary** (KKLD) (La Kanĵi-Vortaro por Lernantoj de Kodansha). Ekde la debuto en 1999 tra la revizio kaj ampleksigo en 2013, ĝi respondadas al la bezono pri facile uzebla kanĵi-vortaro, sufiĉe kompakta por facila kunportado, tamen sufiĉe detala por kontentigi la praktikajn bezonojn de seriozaj lernantoj.

La baza celo de la vortaro estas ebligi al la lernantoj funde kompreni, kiel kanĵioj estas uzataj en la japana lingvo de la nuntempo, disponigante tujan aliron al



abundo da esencaj informoj pri la signifoj, legoj kaj kunmetaĵoj de la plej ofte uzataj kanĵioj.

Precipe unika kaj aprezinda trajto estas la **kerna signifo**, konciza ŝlosilvorto, kiu difinas la plej bazan nocion de ĉiu kanĵio. Ĝin sekvas detala priskribo pri disbranĉiĝintaj signifoj, kiu klare demonstras, kiel limigita nombro da bazaj konstrubrikoj povas kombiniĝi por formi sennombrajn kunmetitajn vortojn.

Klaraj, kompletaj kaj ekzaktaj **karaktraj signifoj**, ilustritaj per nombro da kunmetitaj vortoj kaj ekzemplaj frazoj, estas klasifikitaj ĉirkaŭ la kerna signifo laŭ logika maniero, tiel ke ili perceptiĝas kiel integra unuo. Krome provizitaj estas gvidaj rimarkoj por ĝusta distingado inter facile konfuzeblaj karaktroj, inkluzive de homofonoj kiel ekzemple 変える "ŝanĝi" kaj 換える "interŝanĝi".

Alia unikaĵo estas la **System of Kanji Indexing by Patterns** (SKIP) (Kanĵi-Indeksada Sistemo laŭ Strukturtipoj), kiu ebligas rapidan kaj trafan elserĉon de celata karaktro kvazaŭ en alfabeto vortaro. La sistemo estas rapide ellernebla kaj facile uzebla, do tiu ĉi vortaro estas vere oportuna vortoserĉilo por lernantoj sur ĉiuj niveloj.

## **Faka Ekzakteco**

La angla fonteldono, sur kiu baziĝas la KVL-Serio, estas produkto de rigora leksikografia esplorado kaj sistema kompilado. La celo estis registri la aktualan lingvouzon de la vivanta idiomato kaj neniel simple reprodukti la priskribojn de antaŭaj verkoj kiel ofte okazas ĉe tradiciaj kanĵi-vortaroj. Por atingi ekzaktecon kaj klarecon, ĉiu signifo estis freŝe skribita surbaze de funda semantika analizo. Tiuj klopodoj estis aprezitaj de aŭtoritatoj pri la japana lingvo kaj en Usono kaj en Japanio, kiuj konfirmis ĝian fakan ekzaktecon kaj donis sian entuziasman subtenon.

Simile, ĉiu vortaro el la KVL-Serio estas kompilata ekspluatante la plej lastatempajn atingojn de pedagogia leksikografio kaj de cifereca eldonteknologio. Tio garantias altan nivelan de ekzakteco, konsekvencon aplikadon de la redaktaj principoj kaj belegan, estetike okulplaĉan dezajnon. Speciala fortostreĉo estis farita por selekti la ĉefredaktiston por ĉiu lingvo, kun la rezulto, ke teamo de tre kleraj redaktistoj kun kompetenta scipovo de la koncernaj lingvoj tradukas la vortaron laŭ striktaj gvidlinioj por efektiviigi la

plejeble altan kvaliton.

## **Karakterizaj Trajtoj**

La KVL-Serio ofertas al la lernantoj nombron da trajtoj de speciala valoro:

- Kvin serĉmetodoj kaj tri indeksoj ebligas rapidan eltrovon de celataj karakteroj.
- Okulplaĉa paĝaranĝo kaj tre uzantamika dezajno faras la konsultadon de la vortaro plezura.
- 1,006 kapkarakteroj kovras ĉiujn bazajn kanĵiojn difinitajn en preskribo de la japana Eduk-Ministerio.
- 1,370 kernaj signifoj difinas la plej bazajn nociojn de ĉiu kapkaraktero.
- Ĉirkaŭ 19,000 kunmetitaj vortoj kaj ekzemploj klare ilustras la karakterajn signifojn.
- Granda nombro da homofonoj kun kernaj signifoj klarigas la diferencojn inter falsamikaj karakteroj.
- 1,006 diagramoj pri la vicordo de skribstrekoj montras kiel skribi ĉiun kanĵion.
- 3,799 legoj de karakteroj, inkluzive de 950 legoj de nomoj, kovras ĉiujn prononcojn de la kanĵioj en ofta uzado.
- 307 krucreferencoj faciligas efikan elserĉadon de karakteroj.
- Pluraj apendicoj disponigas aliron al amaso da utilaj referencdatenoj.

Dank' al tiuj trajtoj, la lernantoj de la japana lingvo tra la mondo nun havas je sia manatingo neelĉerpeblan fonton de informoj pri kanĵioj, kiu estas lingve ekzakta, facile uzebla kaj ĝuste respondanta al iliaj praktikaj bezonoj.

### CJKI

**La Vortara Instituto ĈJK, Korp.** fakte okupiĝas pri ĉina, japana kaj korea leksikografio. ĈJKI estas gvidata de Jack Halpern, ĉefredaktoro de la Nova Japana-Angla Vortaro pri Kanĵioj kaj diversaj aliaj vortaroj, kiuj nun estas normaj referencmaterialoj por japanlingva studado. ĈJKI estas unu el la monde plej gravaj fontoj de vortaraj datenoj por ĈJK kaj por la araba lingvo kaj estas kontribuanta al informadika teknologio de ĈJK kun siaj altkvalitaj leksikonaj resursoj.

**La Vortara Instituto ĈJK, Korp.**

34-14, 2-chome, Tohoku, Niiza-shi, Saitama 352-0001 JAPANIO

Tel.: 048-473-3508 Faks.: 048-486-5032

Retpoŝto: jack@cjki.org TTT-ejo: www.cjki.org